

Johann Wolfgang von Goethe,	Johann Wolfgang von Goethe,	Johann Wolfgang von Goethe,	Johann Wolfgang von Goethe,
Same	Super montoj regas kviet'	Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)	Egalaĵo (Noktokanto de migranto)
<i>tradukita de Pejno Simono</i>	<i>tradukita de Poul Thorsen</i>		<i>tradukita de Manfredo Ratislavo</i>
Super montopintoj — silent', tra pinoplingloj la senvent' spiras sen fort'; arbare la birdoj ekmutas. Pretu, aludas silento pri mort'.	Super montoj regas kviet', tra l' foliaro nur ventet' spiras kun trem'. Birdoj arbare silentas, se vi atendas, pacas vi mem.	Über allen Gipfeln Ist Ruh, In allen Wipfeln Spürest du Kaum einen Hauch; Die Vögelein schweigen im Walde. Warte nur, balde Ruhest du auch.	Super ĉio iĝas Kviet', Kaj ne moviĝas Pro ventet' Iu foli'; Silentas la birdoj ĉirkaŭe. Atendu — baldaŭe Ripozos vi.
...

Traduko de la Germana poemo “*Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)*” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de PEJNO SIMONO (*Simon Edward Adrian Payne*, *1941-12-23).

Arg-356-1974 (2014-03-14 14:12:56)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://eo.wikipedia.org/wiki/Goethe>.

Traduko de la Germana poemo “*Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)*” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de POUL THORSEN (*1915-01-07 – †2006-01-30).

Arg-356-708 (2010-05-28 21:34:24)

Poul Thorsen estis dana Esperantista poeto, kiu verkis multajn originalajn kaj tradukitajn poeziaĵojn en la Internacia Lingvo. Vidu ankaŭ: <http://www.poulthorsen.dk/> kaj <http://www.liberafolio.org/2006/forpasis-poul-thorsen/view>.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22).

Arg-356-705 (2013-12-12 22:17:04)

Verfasst am 6./7. September 1780 auf dem Kickelhahn (Gickelhahn) bei Ilmenau (Thüringen), wo Goethe die Verse mit Bleistift an die Bretterwand einer Jagdhütte schrieb. (Anm. d. Hrg.) Goethe verkis tiun ĉi poemon je la 6./7. de Septembro 1780 sur la monto Kickelhahn ĉe Ilmenau en Turingio (Germanio). Tie li skribis la versojn per krajono sur la tabulo-vandon de ĉasista kabano. (rimarkigo de l' eldoninto)

Traduko de la Germana poemo “*Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)*” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (*Manfred Retzlaff*, *Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio*, *1938-11-04) en 1983-01.

MR-03-4 / Arg-356-707 (2006-03-20 14:44:12)